ISSN: 0871-9241

# NiaBulteno

JANUARO-MARTO 2004 JANEIRO-MARÇO • Numero **83**

Informa Bulteno de Portugala Esperanto-Asocio

*Boletim Informativo da Associação Portuguesa de Esperanto*

Rua Dr. João Couto, 6-r/cA, PT-1500-239 LISBOA • +351 +217 141 359 • info@esperanto.web.pt • www.esperanto.web.pt

## Portugalio sen UEA-peranto:

## Almeida proteste demisias!


pĝ. 4




R.R.

## lingvo-diverseco

portugaloj alvokataj strasburgen!



## XX-a Renkontiĝo de Portugalaj Esperantistoj

# Tábua

## septembro 2004

pĝ. 3

**Ĝenerala Asembleo kaj esperantlingva televido martfine:** pĝ. 3,12

*Nia Bulteno* (informa bulteno de **Portugala Esperanto-Asocio**)
Numero **83** (jan.-mar. 2004)
**ISSN:0871-9241**
**Redaktoro:**
António Martins-Tuválkin
**Eldonkvanto:** 400 ekzempleroj
Komputile kompostita per *Adobe InDesign*™ 1.6
**Abono (4n-roj, nur ekster PT):** 8-ono de landa MA de UEA
**Limdato** por *NB***84**: 2004.03.31
**Finkompostita** en: 2004.02.23

***Portugala Esperanto-*
*-Asocio***
**Associação Portuguesa de Esperanto**
*(pessoa colectiva de utilidade pública)*
⊙ sabate 15:00-19:00; sideje
✉ Rua Dr. João Couto 6 r/c A
PT-1500-239 LISBOA
☎ +351 217 141 359
🖷 +351 217 933 924
💻 ‹info@esperanto.web.pt› aŭ ‹portugala@esperanto.web.pt›
💻 http://www.esperanto.web.pt/

*Baldaŭ ĉispace… (pĝ.3)*

**Fondita** en 1972.04.25
**Landasocio** de U.E.A. ekde 1979
**K-ano A:** Faria de Bastos
**Membroj:** 125(+68) en 2004.02.18
**Monata kotizo:** 1,50€
(emeritoj kaj sub-18-jaruloj: 1,00€; malriĉuloj: 0,00€)
**Aniĝkotizo:** 2,50€

### *Gvidorganoj:* *(ekde 2003.03.29)*

### *Ĝeneral-Asemblea Stabo:*
**Prezidanto:** José Martins
**Sekretarioj:**
Miguel Oliveira
Werther Sacramento

### *Estraro:*
**Prezidanto:** Faria de Bastos
**Vicprezidanto:** Martins-Tuválkin
**Sekretario:** Alcino Alves
**Kasisto:** Silva Almeida
**Voĉdonantoj:** Luís Ladeira
Gonçalo Neves
Alexandra G. e Paz

### *Kontrol-Komitato:*
**Prezidanto:** Vítor Marques
**Revizoroj:** Francisco Melo
Manuel Ruas

### *Neelektitaj Postenoj:*
**Instruado:** (vakas)
**Libro-Servo:** Silva Almeida

# *Jen kun la nova jaro* venas

al vi plia numero de *Nia Bulteno*. Ĝi alportas la kutiman paletron da novaĵoj pri esperanto en Portugalio; kelkaj kuntiros viajn brovojn, aliaj streĉos viajn vangojn ridete, ceteraj espereble igos vin kuspi la manikojn kaj plu- aŭ ek-labori. Jen spitoj: al via aktivemo, per karavano strasburgen (pĝ. 4); al via memoro kaj detalamo, per registro de historio (pĝ. 9), al via partiĝemo, per renkontiĝalvoko (pĝ. 3); al via subtenemo, per epokfara projekto (pĝ. 12); al via ĵaluzo, per promenraporto (pĝ. 8); aŭ al via legemo, per reklamo de poemaro (pĝ. 9) — jen brikoj per kiuj fariĝas nia bulteno: Spitoj, spronaj al konsciigo ke nia afero unikas kaj tre gravas, ebliganta samtempe profundan personan ĝuon kaj mondskuan reformon. ***Red.***

**Biblioteko:** Werther Sacramento
**(periodaĵoj)** Wílson Brígido
**(eltondaĵoj)** Martins-Tuválkin
**(diversaĵoj)** (vakas)
**Libreldonoj:** Rocha da Costa
**Fotarkivo:** Olga Almeida
**Subvencipetoj:** Sandrina Rodrigues
**Ret- kaj komput-aferoj:**
Nuno Magalhães, Martins-Tuválkin, Luís Oliveira, Luís Mourinho

### *Lokaj Sekcioj:*
**PLUS — Portugala Unua Loka Sekcio** (nordokcidenta sekcio)
**Repr.:** Nuno Magalhães
**Fond.:** 2002 **Membr.:** 20(+3)
✉ Rua Paulo da Gama, 550-12ºA
PT-4150-589 PORTO
☎ +351 917 721 868
💻 ‹plusanoj@clix.pt›

### *Junulara Sekcio:*
Portugala Esperanto-Junularo
*Jovens Esperantistas de Portugal*
(L.S. de TEJO ekde 1996)
**Fond.:** 1993 **Membr.:** 13(+13)
⊙✉☎🖷💻 ĉe P.E.A.

### *Honoraj Membroj:*
António da Silva Almeida
Alsácia Fontes Machado†
Manuel de Freitas†
Alberto Pedro da Silva†
Adelino Franco Simões†
Manuel de Sousa Teixeira†

### *Aliaj Organizoj:*
**Nogeso — Norda Grupo de Esperanto-Studado**
⊙ 1-an dimanĉon de ĉiu monato 21:00; kafejo *Estrela d'Ouro*; str. *Fábrica*; Oporto
✉☎🖷 ĉe PLUS
💻 ‹esperanto@mail.pt›
🕸 http://www.nogeso.cjb.net/

**Saluton! — *Cooperativa dos Amigos do Esperanto e da Natureza***
⊙ 2-an dimanĉon de ĉiu monato 15:00; *Cacém*
✉ Avenida Bissaia Barreto, 2
PT-3360-191 PENACOVA
✉ Rua do Miradouro, 12
PT-2735-300 CACÉM (SNT)

**Brageso — Braga Grupo de Esperanto-Studado**
⊙ ĵaŭde 21:00; kafejo *S. Brás II* (iama *Mutamba*); str. *D. Pedro V*
💻 ‹esperanto_braga@mail.pt›

### *Landaj Reprezentantoj:*
**U.E.A.:** (vakas — vd. pĝ. 4)
**ILEI:** João Santos (deleg.)
**E.E.U.:** Faria de Bastos
**TEJO:** Ricardo Toscano (A-kom.)
**TEĴA:** Alan Romero
**ILERA:** Francisco Melo (CT1CGE)
**EJA:** Faria de Bastos
**SAT:** Pedrosa Alves (kotizp.)
**IKEK:** Alcino Alves
**IKUE:** Salete dos Santos

ARANĜOJ:

# *Tábua gastigos la XX-an*

Invite de loka aktivulo Manuel Pinguinha, estis decidite en la januara estrarkunveno ke la **XX-a Renkoniĝo de Portugalaj Esperantistoj** okazos en la urbeto *Tábua*, 45 km nordoriente de *Coimbra*. Tiu ĉi aranĝo havos laŭkutime kaj publikan programon, celantan neesperantistojn kaj amasinformilojn, kaj poresperantistan programon, konsistantan el distra kaj diskuta partoj. Por minimumigi konkurencon kun la someraj eventoj (movadaj kaj aliaj) la renkontiĝo okazos en septembra semajnfino, kio ankaŭ logos eksterlandajn esperantistojn, nelaste pro veteraj konsideroj. P.E.A. esploras pri taŭgaj loĝkondiĉoj kaj allogaj programeroj. Interesatoj nepre sciigu frue pri siaj rezervoj de ĉambroj kaj/aŭ de scenejoj. Kiel kutime, **ne estos pagenda kotizo** — partoprenontoj zorgu nur pri tranokt- kaj manĝ-elspezoj. *AMT*

---

### *Assembleia Geral dos sócios da Associaçao Portuguesa de Esperanto*

## Convocatória

Nos termos do artº 22º dos estatutos desta Associação, convoco a Assembleia Geral para reunir en sessão ordinária, no próximo dia 27 (vinte e sete) de Março, sábado, pelas quinze horas, na sede social da mesma, sita no rés-do-chão «A» do número 6 (seis) da Rua Dr. João Couto, ao Calhariz de Benfica, Lisboa, com a seguinte ordem de trabalhos:

1) Apreciação e votação do Relatório e Contas referentes ao ano de 2002, ouvido o Parecer do Conselho Fiscal.

Convoco desde já a Assembleia Geral a reunir trinta minutos mais tarde, no mesmo local, se à hora marcada não se formar quórum.

Lisboa, 11 de Janeiro de 2003

O Presidente da Mesa,
*Prof.-Dr. José Manuel Gaspar Martins*

---

ARANĜOJ:

# *Z-festo ne*

Pro sideja kondiĉmanko (vd. pĝ. 7) ne eblis okazigi la anoncitan (*NB*82:3) vespermanĝon omaĝe al la 144-a datreveno de Zamenhof. Esepereble en 2004 ĉi mistrafo abunde kompensiĝos… *AMT*

---

BULTENO:

# *Restaĵojn ote*

Restas por publikigo en *NB*84 pliaj kondolencoj, reagoj al la artikolo pri "*casquinha*", raporto pri la "mileŭra" reklamo en *DN* kaj *JL* kaj pri ceteraj gazet-mencioj, korespondpetoj, kaj pri la oficiala ekaktivo de la sekcio PLUS. *AMT*

---

ASOCIO:

# *Logotipos ni*

Publikigo de la nove elektita logotipo de P.E.A. (vd. *NB*82:7) okazos martfine, tuj antaŭ la Ĝenerala Kunveno (vd. ĉipĝ.). Elekton diskutadas ankoraŭ nun ĵurio invitita en 2003. 12.22: (gvid.) Alexandra Paz, Miquel Gómez, Alan Romero, Joaquim Calado, kaj Isabel Coelho — membroj iel fakaj pri grafikarto sed mem ne prezentintaj logotipproponon. *AMT*

MOVADO:

# UEA perdas la portugalian peranton!

En 2004.02.08, per letero al la C.O., demisiis nia U.E.A.-peranto, António da Silva Almeida. Kvankam tiun postenon li glate plenumis ekde 1972, lasttempaj miszorgoj pri konttenado flanke de U.E.A. kaŭzis ĉe li, krom financan perdon, profundan konsterniĝon. Avertinte jam antaŭe sed konstatante nenian solviĝon li finfine decidis ŝiri ĉiujn ligojn al U.E.A., inkl. membrecon kaj delegitecon. Menciindas ke Almeida, 76-jara, esperantisto jam 40 jarojn kaj honora membro de nia Asocio (vd. *NB***76**:7-8), restas unu el la plej aktivaj esperantistoj nialande. Malfacilas ne ligi tiun ĉi protestan demision al tiuj okazintaj depost la Zagreba U.K., ironie kiam reposteniĝas la unua el tiuj forlasintoj. Tiu ĉi perdo estos eble tial la lasta — sed ne pro tio malpli noca. ***AMT***

EKSTERA MOVADO:

# Strasburgen bunte!

Lanĉita de esperantisto Sébastien Erhard (i.a. aktivulo de Esperanto-Bretonio kaj redaktoro de *Vola Püg'*), prepariĝas Eŭropa Bunto, eŭropskala **manifestacio** favore al la **lingva diverseco** en Eŭropa Unio, okazonta en Strasburgo (loklingve: *Strasbourg* / *Straßburg* / *Strossbori*), dum la Eŭropa Tago, la 9-an de majo 2004. Kvankam iniciatita de esperantistoj, Eŭropa Bunto celas arigi manifestacie ĉiujn interesatojn pri lingva diverseco, kaj jam envolviĝis **neesperantaj** instancoj tiufakaj.

P.E.A. serioze subtenas tiun aranĝon kaj numumis estraranon Luís Ladeira kunordiganto de la manifestacipartopreno el Portugalio. Tiu jam kontaktis plurajn **portugaliajn asociojn** konektitaj kun lingvaj aferoj, kaj tial potenciale interesataj, kaj alvokas la **P.E.A.-anaron** al partopreno. Necesas nun ke ĉiu partoprenunto sciigu sian emon (pluraj ĝis nun jame) por ke eblu organizi nian partoprenon kaj **komunan iron**. ***Luís Ladeira***




**Provizora programo**, el la projektpaĝaro en http://europa.bunto.free.fr/:

**09:00** Rendevuo en *Place de l'Université*
**11:00** Bonvenigaj vortoj de organizantoj kaj de delegacioj
**11:30** Manĝo kaj pikniko
**12:30** Koncerto de JoMo (Jean-Marc Leclerc, *Tolosa)* en pluraj lingvoj
**14:00** Ne rapida iro tra la *allée de la Robertsau* kaj *avenue de l'Europe*: Parado, sloganoj, banderoloj, flagoj, kantoj, dancoj, ktp.
**15:30** Alveno al *Orangerie* (apud Eŭropaj Parlamentejo kaj Konsilio)
**16:00** Fina parolado, de eŭropa gravulo
**17:00** Disiĝo de la manifestacio

EKSTERA MOVADO:

# *Dia Internacional da Língua Materna*

***Declaração da Associação Universal de Esperanto* (UEA) *a propósito do Dia Internacional da Língua Materna, 21 de Fevereiro de 2004 (trad. Luís Ladeira)***

«O movimento esperantista associa-se à festa do Dia Internacional da Língua Materna.

»A Unesco tem desde sempre desenvolvido actividades no campo das línguas. E ao festejar o Dia Internacional da Língua Materna, desde 1999, mostra a sua forte dedicação e empenho na contribuição para preservação da herança linguística mundial contra as forças de globalização imposta que não respeitam os indivíduos, nem a suas línguas e culturas.

»Subscrevemos totalmente a declaração do Director Geral da Unesco, Koitiro Matūra, por ocasião do anterior Dia Internacional da Língua Materna, que afirmou: «A Línguas Maternas são únicas porque marcam os seres humanos desde o seu nascimento, dando-lhes sobre o mundo um olhar singular que nunca se extingue, independentemente do número de línguas que se venha a adquirir posteriormente. Aprender línguas de outros é uma maneira de percepcionar o mundo de diferentes formas, fazer-lhe outras aproximações.»

»A política de comunicação e progresso, se não é baseada no respeito e na defesa de todas as línguas, como faz a Unesco, condena ao desaparecimento a maioria das línguas do mundo.

»Somos um movimento pela defesa da diversidade linguística. Os esperantistas pretendem conservar todas as línguas maternas e propõem o uso do esperanto nas relações internacionais como uma forma de comunicar neutralmente sem a imposição da visão do mundo de outrem. **Por isso o movimento esperantista festeja com a Unesco o Dia Internacional da Língua Materna.**» ■

EKSTERA MOVADO:

# *Radikale el Bruselo*

2003.12.07-08, kunveno de la Radikala Partio en Bruselo. Unu el la kvar komisionoj kunvenis pri «Federala Eŭropa Lingvo» (~50-60 homoj el ~400) celante starigon de «komisiono por eksperimentado de internacia lingvo en Eŭropa Unio». Ĉiam haveblis tre profesia tradukado al kaj de esperanto. Post konfeso pri mia neradikalemo (*NB***82**:5), post ĉi tiu unua kontakto mia impreso estas pozitiva. Tia partio, malfermata al novaj ideoj, ne postulanta ekskluzivan aliĝon, permesanta malsamajn opiniojn inter siaj membroj — iĝis al mi tre alloga! (Ĝi kungluas tamen strangajn homojn…) Evidentis dum la kunveno ke sampartianoj ne kunsentis pri kelkaj temoj, inkl. pri esperanto: Eĉ se ERA ("Esperanto" Radikala Asocio) jam de 10 jaroj ekzistas, verŝajne malmultaj radikaluloj parolas esperanton… Ili tamen respondecas pri la aperado de esperanto en la eŭropuniaj scenejoj, kaj tiu **politika** agado, en mia humila impreso, tre gravas! ***José Martins***

ASOCIO:


# *Forton pli freŝan*

■ *António Martins-Tuválkin*

Ĉu pro manko de longa sekeco aŭ de ventoj subitaj, ĉu pro pli banalaj motivoj, en lastaj jaroj akumuliĝis inter nia anaro grand(iĝant)a grupo da tiuj kiuj iam havis ian momentan intereson pri esperanto, surbaze de kiu ili misdecidis membriĝi al la asocio por baldaŭa malapero. Tial jam en 2002 okazis plia membrarlista aktualigo por determini la precizan statuson de tiuj fantomiĝintaj asocianoj. En tiu etapo forfalis tuj kvardeko da evidentaj kazoj, rutine solvitaj, kaj en aprilo tiujara kvindeko da poŝtkartoj estis dissenditaj al la plej krizaj kazoj, sciigante ke nereagon ni interpretos kiel esprimon de neinteres(iĝ)o pri esperanto.

Venis kelko da reagoj, pleje kun kotizpago kaj ekskuzoj trankviligaj, aliaj aktive konfirmante la suspektatan

| jaro | totalo | novaj | eksaj | forlasoj | kotizeksigoj | malaperoj | forveturoj | mortoj | nekonate |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 1972 | 285 | 290 | 0 | 0 | 0 | 0 | 0 | 0 | 0 |
| 1973 | 403 | 122 | 4 | 0 | 0 | 0 | 0 | 1 | 3 |
| 1974 | 475 | 77 | 5 | 0 | 1 | 0 | 0 | 3 | 1 |
| 1975 | 447 | 29 | 57 | 9 | 1 | 0 | 0 | 2 | 45 |
| 1976 | 395 | 27 | 79 | 6 | 2 | 0 | 0 | 1 | 70 |
| 1977 | 307 | 20 | 108 | 7 | 0 | 0 | 0 | 1 | 100 |
| 1978 | 272 | 40 | 75 | 3 | 0 | 0 | 0 | 1 | 71 |
| 1979 | 339 | 100 | 33 | 2 | 0 | 0 | 0 | 0 | 31 |
| 1980 | 380 | 63 | 22 | 0 | 0 | 0 | 0 | 2 | 20 |
| 1981 | 445 | 83 | 18 | 0 | 0 | 0 | 0 | 1 | 17 |
| 1982 | 502 | 80 | 23 | 0 | 0 | 0 | 1 | 3 | 19 |
| 1983 | 463 | 18 | 57 | 1 | 0 | 0 | 0 | 3 | 53 |
| 1984 | 417 | 47 | 93 | 34 | 2 | 1 | 0 | 8 | 48 |
| 1985 | 381 | 21 | 57 | 9 | 0 | 0 | 1 | 4 | 43 |
| 1986 | 366 | 29 | 44 | 6 | 0 | 0 | 0 | 1 | 37 |
| 1987 | 370 | 42 | 38 | 3 | 1 | 0 | 0 | 2 | 32 |
| 1988 | 333 | 19 | 56 | 3 | 6 | 0 | 1 | 1 | 45 |
| 1989 | 303 | 25 | 55 | 3 | 24 | 0 | 0 | 2 | 26 |
| 1990 | 301 | 30 | 32 | 6 | 12 | 0 | 0 | 6 | 8 |
| 1991 | 303 | 22 | 20 | 3 | 8 | 0 | 0 | 6 | 3 |
| 1992 | 312 | 24 | 15 | 3 | 3 | 0 | 1 | 7 | 1 |
| 1993 | 241 | 13 | 84 | 25 | 49 | 1 | 1 | 7 | 1 |
| 1994 | 258 | 30 | 13 | 7 | 3 | 0 | 3 | 0 | 0 |
| 1995 | 276 | 27 | 9 | 2 | 2 | 3 | 0 | 2 | 0 |
| 1996 | 294 | 29 | 11 | 1 | 0 | 4 | 0 | 6 | 0 |
| 1997 | 294 | 7 | 7 | 2 | 0 | 2 | 1 | 2 | 0 |
| 1998 | 298 | 6 | 2 | 1 | 0 | 0 | 0 | 1 | 0 |
| 1999 | 298 | 9 | 9 | 1 | 0 | 0 | 1 | 7 | 0 |
| 2000 | 290 | 6 | 14 | 3 | 0 | 3 | 0 | 8 | 0 |
| 2001 | 284 | 3 | 9 | 1 | 0 | 6 | 0 | 2 | 0 |
| 2002 | 204 | 20 | 100 | 10 | 72 | 10 | 0 | 8 | 0 |
| 2003 | 194 | 12 | 22 | 5 | 9 | 4 | 1 | 3 | 0 |



neinteres(iĝ)on — tiuj aldoniĝis al la nereagintoj kaj da forfalintoj estis 82. Do la membrnombro estis falinta al 204 fine de 2002 — apenaŭ pli ol du trionoj de la antaŭjara nombro, kaj relativa nadiro (la sekva plej malalta nombro estis en 1993: 241 membroj).

### 2002: tamen ne katastrofa jaro

Eble tiu reduktiĝo aspektas kiel granda perdo, sed neniu trompiĝu pri tia balastelĵeto: Se nombroj gravas ni do eble atentu la falon de membriĝoj, afero zorgiga, eĉ konsiderinte la neindon de kaprica asocianiĝo.

Kompreneble ĉiujare iom da membroj forfalas pro estrara inciato (t.n., provizora ĉesigo de membrrajtoj, okaze de longa nepago aŭ pro kontaktperdo), kaj pro sciigataj eksiĝoj kaj mortoj, sed ne ĉiam eblis sisteme trakribri la tutan membraron, analizi la krizajn kazojn, kaj kontakti homojn telefone, letere kaj eĉ vizite. Lastfoje tia "purigado" okazis en 1993; ekde 2002 tio tamen faratas rutine.

### Kio vere gravas

Detala superrigardo pri ĉio ĉi troveblas en *Nia Bulteno* **66**, pĝ. 14-15; diferencoj inter tiuj ĉi nombroj kaj tiuj publikigitaj antaŭe (*NB*66:14-15, *NB*63:8-9 kaj *NB*62:10-11), pri la nombro de membroj jarfine ĝis 1986, ŝuldiĝas ĉefe al korektita estimo de nedokumentitaj eksigdatoj.

Oficialajn membrnombrdeklarojn P.E.A. ekde marto 2003 indikas dusumere (vd. ekz. pĝ. 2); la totala nombro indikas la membraron de ni agnoskata, la eksterparenteza proporcion de ĝi laŭ la kotizaro enkasigita en la lastaj 12 monatoj. Ĉilastan valoron oni uzas por kalkuli kontribuojn, ekz. al U.E.A.

Kio kompreneble gravas plej estas ja ne kiom multas la asocianoj sed kiom evoluinta kaj dinamika estas esperanto en Portugalio. Se ĉilasta indikilo (kiel ajn mezurata) pozitivas, do la membraro ŝveliĝos per aktivaj membroj. Kaj pri tiu temo legu en la sekva numero de *Nia Bulteno*. ■

---

SIDEJO:

## *Riparoj & donacoj*

La longe preparata sideja **riparo** finfine konkretiĝis januare kaj februare per indigo de la saloneto kaj de la necesejo. Muroj farbitaj, riparita pavimo kaj nova meblaranĝo estas la atingoj; rezultoj estu pli agrabla, komforta kaj alloga sidejo. La laboron gvidis Martins-Tuválkin kaj laŭe ŝvitis Luís Ladeira, Alcino Alves, Ĝina, kaj Pedrosa Alves — ĉi lasta per impresaj kaj ege utilaj laboremo, kreivo kaj elstara teknika lerto! Sekvos la tre urĝa beligo de la koridoro, kies breĉoza grizeca muraro timigas novulojn je la unua vizito. Sen ŝanĝoj restas la estrareja situacio (vd. *NB*82:3).

Plia sideja riĉigo estas la **donacoj** kaj longpruntoj kiuj neordinare alfluis lastmonate: Televidilon tre oportune de Jaime Correia; delonge promesitan komputilan materialon de Martins-Tuválkin; esperantaj libroj, gazetoj kaj diversaĵoj de Franco Simões (ne tre abunde ĉar li jam multegon donacis vivante); plus vastan kaj valoran diverson da teknikaĵoj el João Santos, inkl. telefonon, sterean amplifilon, laserdiskilon, tujfotilon, kaj treon da komputila k.s. materialo. ***AMT***

XIX–A R.P.E.:

# *Veturpeti esperantien (2/3)**

■ *Nuno Magalhães*

Nokte ni eliris kun António kaj Marta al amasvendejo *Colombo* kie ni vespermanĝetis. Revenante Marta lasis sian patron en la bushaltejo (farendaĵoj lin atendis sideje**) laŭ promeso ke li ne farus fuŝaĵojn kaj estus bona knabo. De tiam senzorga, ŝi dormis la unuhoran vojaĝon. Fakte la ŝtoneto ne plu vekiĝis ĝis mateno!

**XIXira renkontiĝo**

Mateno… pordvoko… ĉu? Kie? Kiel? Anĉjo? «Ĉu vi ankoraŭ estas tiel?!» Estis la 09:30a kaj iu ĵusvekita vesperto malfermis la pordon kaj unu okulon mienante Kiu-estas-mi-an vizaĵon. La elektrulo (ĉu li havas kafon anstataŭ sangon?) tuj solvis la aferon kaj haste eliris al *Vila Franca*. Iom poste la aliaj kvar estaĵoj vekiĝadis kaj pretiĝis por eliri. Irina al teatrejo kaj ni kaj sinjorino Marta al *Vila Franca*. Alvenintaj ni tuj trovis la bibliotekon, kie nin salutis la afabla Alcino. Enirante la saloneton ni alvenis jam programmeze kaj ĉeestis prezenton de libro**. Mi trovis samsekcianan sinjoron Fernando Costa, kiel ĉiam vervan kaj junecan, inter aliajn konatulojn kaj la programo fluis al apuda preĝejo kaj muzeo. La konstruaĵoj estis belaj.

Dum la tagmanĝo ni promenadis kaj manĝetis tra la vilaĝo (pli bonhavaj partoprenantoj restoraciis) kaj finfine ripozis sub ombro. Reveninte ni promenadis busen, sed iom ĥaose. La grupo disiĝis kaj dum la antaŭaj paŝantoj promenetis parke, la malantaŭaj perdiĝis apud fervojo. Nek cetero da grupo nek gvidistino estis tie. Iu buso estis parkita apude sed neniu en aŭ apud ĝi. Feliĉe la gvidistino ne aperis tuj aŭ ŝi estus mortigita de s-ino Olga, kiu kriis (prave) ke ŝi, la gvidistino, kulpis pro la situacio, ĉar estis ŝia devo kunigadi la grupon. Sed ĉio fluis kaj post iom la unua grupparto alvenis apudbuse — la grupo rekuniĝis. Bone, preskaŭ, ĉar mi revenis parken por preni tri ulojn. La programo malfruiĝanta dum ili promenis laŭ la fontetoj — kaj mi emis tiri ilin busen ju pli rapide des pli bone. Mi preskaŭ sukcesis — preskaŭ, ĉar kiam ni alvenis, la buso ne plu estis tie. Ni ĝin kaptis apud la stacidomo.

La unua bushaltejo estis montpinto kie staris ulo sur kolumnpinto. Due ni haltis en palaca domo, kie ni promenis. Ene ni trovis anas-, pav- kaj blankkolombejon kaj ĝardenojn kaj parkon. Verŝajne diversa, kun drakarboj (*dragoeiro*) kaj aliaj vidindaj arboj. Al mi persone plaĉis la klarigon de Alcino pri *Ficus elastica* kaj al li ni donacis bieron dum la tria bushaltejo, en *Alhandra*, ĉar demandite pri ajna volo tian sensoifigan deziron li esprimis. Tamen, ni ne trovis lin buse, sed kafeje, jam bierumanta kun aliaj samideanoj. Oni dividu kaj profitu. Tiam alvenis la memeskortiva Marta kaj s-o Werther, kiu nin ĉiuj ĉe tablajn regalis per prembarela biero (*imperial*, laŭ tiuregiona vortumado; ĉinorde estas *fino*). Kaj kiel bone ĝi gustis sub tia varmo! ▸*NB***84**

* unua parto en *NB***82**:3-4.

** rilatas al la lastmomenta eldono menciita en pĝ.9.

JUNULARO:

## *Aranĝkolore*

Organizi ĉijare junularan iberan renkontiĝon planas i.a. portugaloj. Kvankam ja ekzistas kelkaj junaj esperantistoj, nia junulara movado bezonas reviglígon — kaj renkontiĝo tia povus tre multe helpi. (Nu, kaj iel ajn, renkontiĝi, diboĉi, paroli kaj esti kun aliaj homoj estas ja ĉiam sufiĉa kialo!) ***Xana***

LIBROJ:

## *Artur Hipácio finfine libre*

Jam antaŭ pli ol 12 jaroj (*NB***58**:14-15), unu jaron post lia forpaso, P.E.A., nome de João Santos, sciigis intereson publikigi la verkaron de tiu ĉi «esperantista poeto, tre portugala, nekonata sed elstara». Tio finfine fariĝis en nemultaj tagoj (!) kaj la lanĉo de maldika sed valora libreto okazis dum la XIX-a R.P.E. (2003.06.14, *NB***82**:3-4): Temas pri A5-formata volumo 42-paĝa kun titolo taŭge prenita el la enhava poemo. La 1-a preso ŝlagre vendiĝis surloke kaj elĉerpiĝis per sendoj al recenzo. El la 2-a preso (post "mendego" far U.E.A.) vendeblas po nur 4,00 € en nia Libro-Servo (kodo 09.019). ***AMT***

MOVADHISTORIO:

## *Gutoj malgrandaj*

Laŭ *NB***49**:5, post sia retiriĝo de la estraro en 1991, Franco Simões plene dediĉis sin al jama maroto metie eldoni novajn esperantajn librojn (kaj reeldoni malnovajn). Tamen ne nur tio konsumis liajn lastajn jarojn kiel esperantisto. Li ankaŭ multe okupiĝis pri la historio de esperanto en Portugalio:

Komence per klasifikado de malnovaj fotoj (tasko kiun transprenis Olga Almeida), poste per kolektado de etaj disaj faktoj: Ja se kompilo de historiografia monografio estas tasko tro mamuta por ĝiaj eblaj plenumuntoj, lia aliro estis genie formika: Li kolektadis en datenbazon (*Excel*) po plej diskretajn unuojn: Daton, etan rakontan frazon (inkl. ev. referencon al aliaj tiaj registroj), fonton. (Vd. ekz. ĉisube.) Mi helpadis lin per statistikado kaj eksperimenta HTML eksporto (baldaŭ paĝare).

Tiu laboro restis tute ne kompleta, ankoraŭ en prova stadio. Franco Simões antaŭvidis duan fazon kiam ĉies memoro kaj bonvolo poere grandigos la tuton. Tiun fazon fruigis lia forpaso. Partoprenu, do! Skribu iun eran fragmenton de la historio de esperanto en Portugalio, datumu ĝin, kaj sciigu al la Asocio. Iom post iom, diskrete sed efike, kreiĝos valora kolekto de facile konsulteblaj informoj pri esperanto en Portugalio. Per ĉies kunlaboro! ***AMT***

| dato | priskribo | fonto |
|---|---|---|
| 1950.??.?? | Aníbal Silva ekinstruas en *Soc. Recr. União Pragalense* | Corr. Marq. |
| 1986.09.04 | Forpaso de Adolfo Nunes | *NB***29**:3 |
| 1993.01.28 | P.E.A. transdonas peticion en la Parlamento | *NB***60**:8 |
| 1996.10.24 | Ekas Expolíngua Portugal, kvara partopreno de P.E.A. | *NB***70**:4 |
| 2003.02.15 | Portugalaj esperantistoj partoprenas kontraŭmilitan manifestacion en Lisbono | *NB***81**:5 |

NEKROLOGO:

# *Franco Simões (1924-2003): perdo sub verda standardo (2)**

**Multflanka talento**

Skribi pri Franco Simões estas rememoriga afero, kiun mi ĉagrene plenumas.

Tamen iom jam oni parolis pri li, kaj mi volas aldoni, ke li estis unu el la akolitoj, kiuj helpis la esperantistan pastron Manuel Torres Lima, en la unua katolika Diservo en Esperanto portugalie, okazinta dum la XI-a R.P.E. en *Santo Tirso*, 1983.

Ankaŭ li gvidis la koruson, kiu sin prezentis en la V-a R.P.E. okazinta en *Caldas da Rainha*, 1977, per esperantigitaj kanzonoj.

Mi rememoras ankaŭ, ke mi mem iam ricevis de li la unuajn lecionojn pri komputiluzado, sen kiuj kredeble mi ankoraŭ hodiaŭ estus absoluta nenio en tiu fako.

Multon ni, portugalaj esperantistoj, perdis pro lia malapero de el inter ni… Ke li ripozu en paco!

***A. S. Almeida***

**Kiel kavaliro damon**

Kun Adelino Franco Simões mi konatiĝis en 1987, okaze de renkontiĝo de portugalaj esperantistoj en Barejro. Mi tien veturis kiel dusemajna komencanto kaj revenis hejmen kun du bildoj pri li. Alta, kalva kaj liphara figuro de simpatia kaj ĝentila viro, kiu Esperanton prononcas emfaze, stakate, preskaŭ patose. La alia bildo koncernis lian entuziasman pretecon plenumi esperantajn taskojn. Kiam ĉeestanto lin tie petis esperantigi portugalan frazon el ekspozicia panelo, li tuj kaŭriĝis kaj senhezite deklamis, fingromontrante la tradukatajn vortojn: «La portisto portas la ŝarĝon». Li ne nur tradukis kaŭre, sed tuj kompletige aldiris stare, ke "port" estas radiko, "ist" sufikso profesimontra, ke sufiksojn kaj radikojn oni kunmetas por formi novajn vortojn, ke tio ŝparigas al ni lernotaĵojn, ke similajn rimedojn uzas la germana lingvo, ke tamen Esperanto havas proprajn trajtojn, kaj tiel ade plu ĝis li improvize kaj senpage donis tutan lecionon pri nia gramatiko.

Poste ni kunestis en pluraj renkontiĝoj kaj kunsidoj, partoprenis en komunaj taskoj kaj laboroj, kaj ĉiam min impresis la konstanteco de lia karaktero. Tiam temis pri Esperanto, lia buŝo senĉese montris specialan rideton, iel infanan, puran, senpekan kaj anĝelan. Nian aferon li defendis kiel kavaliro damon kaj pastro Kriston. Senhezite. Ame. Pasie, Arde. Ofte li uzis siajn konojn pri aliaj lingvoj (angla, franca, germana, latina) por pledi por nia lingvo. Klera kaj rapidpensa, li ĉerpis ekzemplojn kaj argumentojn el historiaj faktoj kaj teorioj. Li eĉ sciis parkere poemojn kaj aliajn tekstojn, kiujn li deklamis en okazo de bezono. Lia rezonado kelkfoje ŝajnis iom tro naiva kaj fabela, sed tiun minuson plene kompensis lia kapablo emocii kaj eĉ sorĉi la aŭskultantojn. Liaj vortoj kaj gestoj fontis el profunda kaj

(*) Daŭrigo el *NB* **82**:6.

sincera amo, kaj tian amon perceptis ĉiu animo sentema.

«Enterigitoj estas plenaj de meritoj», sed mi ne povas kaŝi, ke lin kelkfoje blindigis lia fervoro, ke li perdis la aplombon kaj okaze de esperantaj aranĝoj li ridinde svingis grandan verdstelan flagon surstrate, ke tio ege agacis junulojn, ke ili hontis kaj eĉ emis eviti lin dum tiaj manifestiĝoj de verda zeloteco, ke antaŭ renkontiĝoj ili eĉ planis malaperigi la flagon… Feliĉe dum maljuniĝo li iom post iom fariĝis malpli svingema, kaj la junuloj forton pli maturan akiris.

Pri liaj movadaj meritoj jam aperis ĉi-gazete kontentigaj nekrologoj. Ĉi-lande li movadumis tiom kaj tiel, ĉiam kaj ĉiel, ke la historion de Esperanto en Portugalio oni prave povus dividi en tri etapojn: de la unua lernolibro ĝis la morto de Saldanha Carreira, de lia morto ĝis la morto de Franco Simões, kaj depost la morto de ĉi lasta. La tria etapo do ĵus komenciĝis. Sen lia agado Esperanto certe estus alia, ol ĝi estas ĉi-lande. Ĝi certe estus eĉ pli sensignifa kaj nebula, ol ĝi estas nun. Espereble ni ĉiuj scios ĉerpi instigon kaj inspiron ĉe lia senlaca laborado.

Li estis granda esperantisto kaj granda homo. Se ne paroli pri flago-svingoj, estis por mi granda plezuro labori kun li por Esperanto (li laboris ege pli ol mi!) kaj ĝui la ravajn momentojn, kiam ni triope (li, João Santos kaj mi) babilis ĉie – eĉ stare ĉe strat-angulo – prio io ajn plaĉa al ni, pri lingvoj, literaturo, politiko, historio, religio kaj alio. De temo flugis ni al temo, kaj rapide kreskis la parolo. Li verve babilis sed ankaŭ ĉiam pretis aŭskulti, neniam interrompis parolanton, neniam trudis sian vidpunkton, neniam disputis, kaj chiam brilis tiu rideto infana, pura, senpeka kaj anĝela sub la maldensaj lipharoj. Li estis ora homo. Neforgesinda kaj neforgesebla.

*Gonçalo Neves*

**Najbara flagportanto**

Mi ĵus legis pri la forpaso de nia kara samideano kaj amiko Franco Simões. Vere mi ne povos forgesi lin, mi ĉian rememoras lin, kune kun e-verda standardo. Miaj sinceraj kondolencoj al ĉiuj portugalaj amikoj!

*Francisco Cabezas (ES)*

INSTRUADO:

# *Kurs' frufine*

La intensiva kurso anoncita en *NB***82**:5 komenciĝis laŭplane en 2003.12.06 sed devis ĉesi antaŭ ol la planita fino pro personaj kaŭzoj. La sep ĉeestintaj lernantoj pluas lernadon sole, kun neformala apogo de la instruinto. *AMT*

INSTRUADO:

# *Studantoj kaj diplomitoj*

La portugalia delegito de ILEI, João J. Santos, dissendis al ĉiuj 16 juniaj **ekzamenitoj** (*NB***81**:3) la atingitan **diplomon**. Kiel dirite, la nivelo estas espe-rige bona. Pluraj el la novdiplomitoj pluas jam sian studadon al pli alta nivelo, kaj iuj eĉ ekagadas movade. Ankaŭ la 54 lernantoj de **projekto AKEL** (vd. *NB***82**:5) plu lernas. La gvidanto de la hispania kurso, José María Salguero, kunvenis januare kun la projektestro, Luís Ladeira. *AMT*

# *Esperanto-Televido*

## *La estonto komenciĝas nun!*

Projekto itv

R.R.



R.R.

**Surfote**, Flávio Rebelo prelegas pri **ITV** en Montpeliero.

*Flávio* Rebelo*, ĉefredaktisto de la sukcesa esperantlingva retgazeto* Ĝangalo *(vizitebla en* http://www.gxangalo.com/*) kaj ĉefa administranto de la* ***Projekto ITV*** *(Internacia Televido), vojaĝas februare kaj marte al 22 urboj en 15 eŭropaj landoj, prelegante pri la establo de ITV — la unua* ***interreta televidkanalo tute en Esperanto****. La prelegoj utilos por detala klarigo pri la funkciado de ITV, por konatiĝi kun la iniciatanto, kaj por debati eventualajn planojn de* Ĝangalo *por tiu regiono de Eŭropo. La estraro de Portugala Esperanto-Asocio* ***verve alvokas*** *la tutlandan esperantistaron amase veni al la* ***lisbona prelego****, okazonta en ties sidejo la 24-an de marto, merkredon, je 18:00. Invitatas eksterlisbonanoj laŭeble gasti ĉefurbe ĝis la Ĝenerala Kunveno sabate (pĝ. 3).*



R.R.

**FR+LL+AMT**

REMETENTE:

**Associação Portuguesa de Esperanto**

***Portugala Esperanto-Asocio***

Rua Dr. João Couto, 6-r/c A

PT-1500-239 LISBOA

Portugal

DESTINATÁRIO:

nº de sócio
*annumero*

últ. quota paga
*lasta kotizpago*

foto
*foto*

*laste ricevita interŝanĝnumero*